Gotthilf Sellin,

# Paca kanto de la Esperantistoj

*Kantebla laŭ la melodio de la germana kanto "Stimmt an mit hellem, hohem Klang".*

1. Nun kantu vi je forta son',
resonu la fanfaroj
de mont' al val', de mar' al ŝton'
en kampoj kaj arbaroj.

2. Nun kantu novan tempon vi,
vi kantu novan teron.
Potencan Dio mem en ni
ekcitis jam esperon.

3. Ne plu batalos en koler'
la bonaj kaj malbonaj,
ne plu ektremos nia ter'
de l' tondro de kanonoj.

4. Japanon, Ruson tie ĉi
admiros ni ligitajn,
Germanon tie vido ni
kaj Francon kunigitajn.

5. Ne Irlandanon Anglo plu
aŭ Hindo nin malbenos,
ne blanka flavan, nigran plu
mokegos aŭ ĉagrenos.

6. Ĉar ĉiuj fratoj estos ni,
amantoj kaj helpantoj,
kaj ĉiuj kompreniĝos vi,
samlingve parolantoj.

7. Kaj kiu estas nun al ni
la kunplektant' rubando?
Ĝin konas ĉiuj, estas ĝi
la kara Esperanto.

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas* Gotthilf Sellin *(∗1844-05-18 – †1921-10-09).*

*Arg-479-929 (2008-10-17 23:17:55)*

*La kanto troviĝis sur paĝoj 18 kaj 19 de la kantlibreto de la 4a Universala Esperanto-Kongreso, okazinta en 1908 en la germana urbo Dresdeno (Dresden).*